


66-a jaro n-ro 194 2025:4

la lampiro



**Remedios Varo**  
alkemia pentristino

# 17º Congresso Paulista de Esperanto

20 - 21 setembro 2025

São José dos Campos-SP

**Hotel Ema Palace**

Rua Jorge Barbosa Moreira, 70

Organização



Apoio



<https://evento.easp.org.br>

# Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**  
Nia revuo plu flagretas
- 5 | **Kino kaj aliaj artoj**  
Remedios Varo
- 7 | **Esplorangulo**  
Spuretoj de nia historio
- 8 | **Kuriozaĵo**  
Recenzeto
- 11 | **Por iom pripensi**  
Pri la disvastigo de Esperanto
- 13 | **Rakonto**  
La knabina kun linharoj
- 17 | **Omaĝe**  
Aloisio Sartorato: majstro pri didaktiko kaj esperantista kulturo.
- 21 | **Iom da filozofio**  
Renkon kun Kartezio en Stokholmo
- 24 | **Iom da poezio**  
San-Paŭlo
- 25 | **Aktuale**  
La influo de amaskomunikiloj
- 28 | **Iom da gramatiko**  
Lingvaj Respondoj
- 30 | **Recenzo**  
Digna omaĝo
- 32 | **El mia ĉiutaga vivo**  
Sekretoj de l'homa sentemo
- 33 | **Personuloj**  
Dorina Nowill: rigardo de viziulo
- 37 | **Turismo**  
Sekretoj de l'homa sentemo
- 40 | **El mia vidpunkto**  
Ĉu literaturo estas inventaĵo?

## Kovrilbildo:

Generita pentraĵo laŭ la stilo de Remedios Varo  
[huggingface/KappaNeuro/remedios-varo-style](https://huggingface.co/KappaNeuro/remedios-varo-style)



66-a jaro n-ro 194 2025:4

## Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

**Redaktanto:** Paulo Sergio Viana  
([psviana@terra.com.br](mailto:psviana@terra.com.br))

**Enpaĝigo:** José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas  
pri la subskribitaj artikoloj*



## Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

### Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca  
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo  
[easp.org.br](http://easp.org.br) | [contato@easp.org.br](mailto:contato@easp.org.br)

### Estraro

**Prezidanto:** Esmeraldo A. Alencar de Lima  
**Vicprezidantino:** Cristina de Claudia Graaf  
**Sekretariino:** Maria Conceição Rodrigues  
**Kasisto:** José R. Tenorio da Silvas

### Konsilantaro

Paulo Sergio Viana  
José Mauro Progiante

### Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

## Jarkotizo por 2025

|                          |            |
|--------------------------|------------|
| Simpla Membro .....      | R\$ 200,00 |
| Subtena Membro .....     | R\$ 400,00 |
| Ŝtatinterna Membro ..... | R\$ 100,00 |

# Nia revuo plu flagretas

Paulo Sergio Viana

Ĉi tiu numero de nia revuo estas bele riĉenhava! Krom la kutimaj kontribuantoj, kiuj ĉiun duan monaton sendas al ni siajn valorajn artikolojn, ankaŭ novaj verkemuloj sin prezentas. Kaj ne nur el nia ŝtato Sanpaŭlo, sed el Suda Riogrando kaj eĉ el Argentino (Dankegon, Bento kaj Trepiana!). Legantoj havas antaŭ si tekstojn pri nia Esperantomovado, pri la lingvo mem, pri arto, pri literaturo... Ŝajnas al mi, ke nia Lampiro prilumas nian kulturon per brila lumo.

Ni registru ĉi tie, ke nia Lampiro iras tra la mondo kun sia flagranta lumeto. Ekzemplo de tio estas la simpatia ago de la eminenta japana Esperantisto Hori Jasuo, kiu diskonigis la majan-

junian numeron de la revuo al siaj sekvantoj. Rezultis de tio, ke kelkaj partoprenantoj en lia Esperanta Sumoo elektis tiun numeron por legado, okaze de la lasta Sumoo. Dankon, kara Hori!

Fine, mi memorigas nian legantaron, ke tre proksime staras la Ŝtata Kongreso de Esperanto, post kelkaj semajnoj. Mi esperas renkonti vin amase en la urbo São José dos Campos, por brakumoj, salutoj kaj riĉa interŝanĝo de ideoj. La programo de la kongreso estas varia kaj interesa. EASP vigle laboras por nia afero en nia ŝtato! Venu, kaj aktivu, ankaŭ vi!

Bonan legadon!

## Negrinjo kaj aliaj noveloj

Monteiro Lobato

Tradukis:  
Francisco S. Wechsler | Paulo S. Viana





Remedios Varo (1908 - 1963)

## Remedios Varo

Anna Lobo de Carvalho

de ŝia patro el la konstruaĵoj kie li estis inĝeniero, kio helpis ŝin perfektigi siajn teknikojn de desegnado. Aldone, ŝi estis kuraĝigita havi sendependan pensmanieron ekde kiam infano kaj havis alirojn al multaj verkoj de verkistoj kiel Alexandre Dumas, Jules Verne kaj Edgar Allan Poe.

Estas interese ke la patro ne aprobis la katolikan edukadon kiun Remedios ricevadis en la katolika lernejo. Li kredis ke ŝi devus ricevi liberan kaj universalan instruadon, ideojn kiujn li mem transdonis al sia filino. Cetere, iu eta kuriozaĵo: ŝia patro estis unu el tiuj kiuj fondis la lokan esperantistan kooperativon de Angles “Libera Popolo”.

Oni povas diri ke la vivo de Remedios estis tre malsana kun koraj problemoj kaj ŝi ekde infanaĝo montris naturan emon al pentrado. Ankaŭ pro la laboro de ŝia patro ili multe moviĝis de urbo al urbo. Ŝia lernado do estis ĉefe en katolikaj lernejoj, kaj kiam ŝi dek-kvin-jariĝis, ŝi eniris en la Akade-

Hodiaŭ mi parolos al vi pri tre interesa pentristino el Hispanio-Meksiko, sed kiu bedaŭrinde ne estas tre konata. Temas pri Maria de los Remedios Alicia Rodriga Varo y Uranga. Ŝi naskiĝis en la urbeto de Angles de Hispanio, en la 16-a de decembro 1908. Filino de Rodrigo Varo y Zavalvo kaj Ignacia Uranga Bregareche, ŝia naskiĝo okazis poste kiam ŝiaj gepatroj perdis filinon je naskiĝo, tial ili donis tiom longan nomon al Remedios.

Ŝia patro estis saĝa kaj amanto de artoj, kaj tio multe influis en ŝia disvolviĝo kiel artistino. Remedios kutime kopiis la plantojn kiuj estis portitaj


mion de San Fernando kaj iĝis unu el la unuaj virinoj kiuj tie studis. Dum tiu periodo ŝi spertiĝis kun artistoj kiel Garcia Lorca kaj Dali. Laŭ la tempo-pasado, ŝi multe enmikisiĝis kun sur-realistma movado kaj aliaj gravaj pentristoj.

Dum la Dua Monda Milito ŝi estis arestita kun sia edzo. Kiam ŝi estis liberigita, ili ekziliĝis en Meksiko. Tie ŝi havis buntan kaj laborplenan vivon kiel publicista ilustristo kaj kun multaj ekspozicioj. Remedios estas konsiderata kiel artisto de la alkemio, kiu sin dediĉas al revivigo de mondoj, kiuj en ŝia pentrado aperas el fabeloj de la nekonscio. Tie ŝi miksas sciencon, mistikecon, esoteron kaj magion.


Mi esperas ke vi ĝuis koni iom pli pri la vivo de tiu tre interesa kaj unika pentristino. Mi instigas vin plu legi pri ŝi kaj esplori pri ŝiaj aliaj verkoj! Ĝis la sekva fojo!



Muta naturo renaskiĝanta, 1962



Kreado de la birdoj, 1957.



La alvoko, 1961

# Spuretoj de nia historio

Miguel Bento

Esperantujo estas niĉo kaj niaj rimedoj estas limigitaj, do estas kompreneble, ke niaj libroj ofte eldoniĝis kaj eldoniĝas malgrandkvante. Tio ankaŭ signifas, ke post disvendo ili rapide iĝas raraĵoj, se ne aperas reeldonoj! Tial, serĉe de dezirataj verkoj mi kaj aliaj vagadas en retejoj kiel Estante Virtual, ĉe kiu ariĝas tre multaj brazilaj librobrokejoj.

Tamen, dum tiuj vagadoj ofte malkaŝiĝas alispecaj esperantaĵoj: medaletoj, moneroj, pingloj, poŝtmarkoj, vimploj, poŝtkartoj... Tiaj anoncoj troviĝas en pluraj retejoj: MercadoLivre, LeilõesBR, eBay... Mi ne estas kolektemulo (miaj familianoj malkonsentus!), do post rigardeto mi kutime preterpasas tiujn ofertojn. Tamen de tempo al tempo aperas io kio kaj kaptas mian atenton kaj havas favoran prezon - tiam mi profitas la okazon.

Freŝa ekzemplo estas poŝtkarto el 1933, sendita de esperantisto el Liono (bedaŭrinde mi ne bone komprenas la subskribon) al Carlos Burg, el Sant'Ana

do Livramento. Tiam la movado en tiu landlima urbo estis sufiĉe vigla: ekzistis ne nur *Livramento Esperanto-Grupo*, sed ankaŭ *Urugvaja-Brazila Esperantista Ligo*, "fondita kun la celo disvastigi Esperanton en la du najbaraj urboj Livramento kaj Rivera"! Carlos Burg prezidis ambaŭ. Cetere, alia tiam aktivulo, Mario Prestinari, respondecas pri la esperantigo de la familio de Sylla Chaves! Skanaĵon de la poŝtkarto mi alŝutis al Internet Archive: [archive.org/details/burg\\_1933](http://archive.org/details/burg_1933)

Poŝtkarto-kolektantojn allogas la bildoj, la markoj, la stampoj... sed kelkfoje ankaŭ la enhavo mem montriĝas valora atesto de nia historio. Feliĉe, la vendantoj kutimas afiŝi bonajn fotojn aŭ skanaĵojn de la kartoj, tiel ke eblas facile ilin legi, eĉ se oni ne aĉetas (bedaŭrinde ne malofte la prezoj - kaj la sendokostoj - estas iom troaj!). Tamen, antaŭ iom da tempo mi rimarkis seriozan problemon: post vendo la malnovaj anoncoj iom post iom komplete malaperas! Nepras do

konservi la informojn, se oni interesiĝas pri la afero.

Jen du sufiĉe gravaj ekzemploj, kiujn mi reproduktas ĉi tie (ne tuŝante la lingvaĵon). La unua estas poŝtkarto de Ismael Gomes Braga al Teo Jung, kun klaĉo pri la organizado de la 11-a Brazila Kongreso de Esperanto! Kaj la dua, de Benjamin Camozato al Hugo Steiner, enhavas belan foton de la Zamenhof-strato de Porto Alegre (siampe aperintan ankaŭ en periodaĵoj, sed en malpli alta kvalito). Mi lasas al vi do la inviton: vagadu ankaŭ vi tra la interretaj brokantejoj, se vi havas tempon kaj emon! Oni neniam scias, kiaj trezoroj atendas. Kaj, se tio ne tiom interesas vin, bonvolu tamen disvastigi la informon, se vi hazarde trovos ion tian!

\*\*\*\*\*

Rio de Janeiro, 3. X. 1947.

Kara Samideano Teo Jung,

*Refluginte Rion post la 11a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en S. Paulo, mi sendas al vi memoraĵon filatelan: Poŝtkarton kaj koverton stampitajn en la poŝtoficejo de la Kongreso.*

*La 11a estas la unua Kongreso preparita sen la lerta kunlaborado de nia karmemora Couto Fernandes. Ĉiujn ceterajn brazilajn kongresojn de Esperanto preparis fakte li, ne la O.K. Li ĉiam sin trudis kaj ĉion faris eĉ sen demandoj al la O.K. Nun li mortis kaj mi iomete devis diktatorece anstataŭi lin, ĉar la O.K. estis tre mallerta. Mi pasigis 3 semajnojn en la kongresurbo. S. Paulo estas dumilionurbo eĉ pli konfuziga ol Rio.*



La O.K. ne havis lokan prestiĝon. La Prezidanto de la Ŝtato eĉ ne akceptis nin. Feliĉe, la centra Registaro kaj diversaj ŝtataj Registaroj – Minas Gerais, Mato Grosso, Santa Catarina k.a., – kie estas gravaj esperantistoj, nin helpis kaj sendis delegitojn.

Ĉio estas nun finita!

Samideane via

I. G. Braga

Plezure mi ricevis vian utilan 1938<sup>an</sup> Tutmondan Adresaron ke mi multe dankas vin. En tiu karto vi vidos la "Zamenhofan Straton" de mi "farita" en honoro al la Jubileo de Esperanto.

Kormanpremon el via samideano

Benjamin C. Camozato

Presidanto de "Sud-Brazila Esperantistigilo"

Porto Alegre, 20/1/38.

\*\*\*\*\*



## Recenzeto

Leandro Abrahão


*Lost in translation (Perdita en tradukado)*

Aŭtoras Ella Frances Sanders

Tradukis Livia Deorsola

Eldonejo Livros da Raposa Vermelha, 2018

ISBN 978-85-66594-35-5



Malve, la bondeziraj tagoj! Tagoj, kiam mi antaŭĝuas la gajnon de iu libro! En la pasinta Kristnasko, miaj gebofratoj donacis al mi ege plaĉan kaj spritan verketon, nome *Lost in translation – ilustrita kolekto de netradukeblaj vortoj el ĉiuj mondopartoj*. Nu, tradukita libro el *netradukeblaĵoj*. Temas pri vortoj, kies origina signifo estus apenaŭ aŭ neniel esprimeblaj per samsignifa vorto aŭ esprimo en alia lingvo.

La aŭtorino kolektis 49 vortojn el 31 lingvoj. Neniun el la portugala tamen. El la japana, ekzemple: KOMOREBI (substantivo); priskribe: *la lumo, kiu radias tra folioj de arbo*. El la sveda: RESFEBER (substantivo); priskribe: *la malkvieta pulsado de koro de vojaĝ-onto antaŭ la ekiro*.

Esperanto estas iasence priskriba lingvo. La libreto konsistigus tre bonan ekzercilon por progresantoj.

Fine, el la hungara: SZIMPATIKUS (adjektivo); priskribe: ĵuskonato, pri kies bonkoreco la ekkonanto intuicias. Laŭ la sesa eldono de la vortareto hungara-esperanta, de Alfonso Pechan, SZIMPATIKUS signifas *simpatia*. Kial do la vorto troveblas en kolekto de *netradukeblaj vortoj*? Laŭ Piron, “la vorto estas standardo, kiu konigas la teritorion”, kiu “povas esti multe pli vasta (...)” (La Bona Lingvo, ĉapitro 5).

Jen recenzeto de nelingvisto, do ordinara legema kaj librama esperantisto.

# Pri la disvastigo de Esperanto

Milton Paulo de Lacerda

Ekde sia kreo, komence de la 20-a jarcento, Esperanto altiris la intereson de homoj. Kiel ĉio, kio komenciĝas, ĝi ekis malgrandskale kaj seninterrompe kreskis kun siaj altiĝoj kaj malaltiĝoj. Hodiaŭ, ĝi ĉeestas tra la tuta mondo, agnoskita pro sia valoro fare de Unuiĝintaj Nacioj kaj pro la granda nombro da siaj parolantoj. Por la celo de ĉi tiu artikolo, plej gravas kompreni, kial, malgraŭ sia nekontestebla valoro kiel komunikilo, ĝi ankoraŭ disvolviĝas tiel malrapide inter ni.

Por tio, ni povas demandi al ni la nivelon de intereso de tiuj, kiuj deklaras sin esperantistoj; de tiuj, kiuj serĉas ĝian vastan literaturon, legas librojn kaj artikolojn en Esperanto; de tiuj kiuj partoprenas en retaj elsendoj, konversaciaj grupoj kaj konferencoj. Ni povas demandi al ni pri la nivelo de nia engaĝiĝo; ĉu nia partopreno estas nur la supraĵa entuziasmo de tiuj, kiuj ĝuas novajn aferojn, sen ia pli granda engaĝiĝo. Alivorte, ĉu ni meritas la nomon "Samideanoj", konscie ampleksante la fontan ideon de la Internacia Helpa

Lingvo, Esperanto. Simptomo de nia nivelo de intereso estas kompreni tion, kio estas **urĝa**, kio ne povas esti prokrastita. Ni vidas ĉie urĝan kaj eĉ tragedian mankon de komprenemo inter la popoloj.

Ankaŭ la **vivnecesajoj**, kiel ekzemple bieno, loĝejo, laboro kaj sano, aferoj kiuj same postulas tujajn respondojn, ĉar ili reprezentas ĉion sen kio ne eblas digne vivi: ekzistas skandala socia malegaleco. Kiom konsciaj ni estas pri la bezono konstrui pontojn pere de ĉi tiu privilegia lingvo, en lokoj kie tiom da muroj de divido estis konstruitaj? Ĉu ni havas la sintenon de mondcivitanoj, de homoj respondecaj pri fari ĉion eblan por mildigi problemojn, ĉar ni sentas nin kiel fratoj kaj fratinoj ene de la tuta homaro?

Kion fine ni serĉas perfektigantan lingvon? Ĉu ni serĉas la komecan, liberigan idealon kunigi kaj kunestigi individuojn tra la tuta mondo? Aŭ, male, la vantecon de memreklamado, montrante ĉie kiom fluaj kaj lertaj

ni estas en la uzado de Esperanto? La idealo de Esperanto estas tiu de universala amo, kiu faras ĉiujn unu granda familio. Nu, vera amo kondukas homojn forlasi sin mem kaj siajn proprajn komfortajn zonojn, pretiĝante por servi, por konstrui novan mondon, kie ĉiu sentas sin bonvenigita kiel fratoj kaj fratinoj, agnoskita kiel havanta egalajn rajtojn, kaj respektata kiel homo.

Ĉi tiuj vortoj ĝis nun celis helpi nin resti firme per niaj piedoj sur la tero, por ne perdiĝi en nerealismaj revoj kaj tempoperdo, en vivo tiel mallonga kiel la nia. Ĉar Esperanto estas tiel grava por la civilizita mondo, ni povas pripensi kiel konigi, akceptigi kaj praktiki ĝin grandskale. Ne por konkuri kun la angla, sed kiel pli alirebla kaj ĝuebla formo de komunikado ol kia ajn lingvo, kiu dominus la mensojn de homoj, ĉar estas multe pli malfacile lernebla kaj uzebla.

Ju pli grava la projekto, des pli necese estas havi PLANADON, inkluzivante klaran CELOBJEKTON, sinsekvajn SUBCELOJN kiel paŝojn farendajn, homajn kaj financajn RIMEDOJN, antaŭvideblajn MALHELPOJN aŭ BAROJN, kaj difinitajn LIMDATOJN kiel mejloŝtonoj por eviti prokrastojn kaj tempoperdon. Per grupa pripensado, ĉar

temas pri afero de komuna intereso, oni povas komenci kunmeti solidan planon, kun eventuala subteno kaj eĉ specialigita konsilo de fakuloj, nome, de tiuj kiuj komprenas la teknikan aferon. Jen do simpla skizo, kiel sugesto.

## **CELOBJEKTO**

### **– LA DISVASTIGO DE ESPERANTO**

#### **– MOTIVARO:**

- \* Kiel okazis al la ribelema plurlingvanoj de Bialistok, la urĝa neceso paciĝi;
- \* la elstaraj kvalitoj de Esperanto (internacia neŭtraleco kaj facilo);
- \* fari amikojn, partopreni eventojn tra la mondo, ĉeeste aŭ virtuale;
- \* trovi la riĉaĵon de aliaj buntaj kulturoj.

## **SUBCELOJ**

- \* Plifortigo de la Motivaro: nenio atingeblas sen konvinko kaj entuziasmo por la afero;
- \* Serĉesploro: pri propagandaj metodoj uzataj en Brazilo kaj tra la mondo.

*(Daŭrigota sur la paĝo 16)*

# La knabino kun linharoj

Juan Trepiana

*(Se eblas, tiu ĉi teksto devus esti legata dum oni tre milde aŭskultas la samnoman verkon de Claude Debussy.)*

—Do, ĉu ne ŝajnis al vi freneze serĉi min post kvindek jaroj?

—Tute ne. Mi pensas, ke mi faris nenion alian en mia tuta vivo.

Lia rigardo tuŝis ŝian rideton kun certa melankolio. Ŝi ruĝiĝis, plena je adoleskeco, kaj ŝiaj okuloj subite rigardis la sunon, kiu ripozis sur la fino de la strato plena de tombŝtonoj en la malnova okcidenta tombejo.

—Aŭskultu... denove tiun muzikon... ĝi ĉiam revenas. “La linhara knabino”. Vi estas tiu knabino, ĉu vi scias?

—Fakte, ĉu vi volas diri, ke fantomoj ne maljuniĝas? Ĉu tio estas tiel? Ne gravas, kiel vi rigardas min, mi estas fantomo. Ĉu ne?

Ŝia rigardo malsupreniris de la suno ĝis la pinto de ŝiaj nigraj, ŝnurumitaj antikvaj ŝuoj.

Ŝi ludeme marŝis, kvazaŭ en malrapida danco, kun tiu dekkvinjara balanciĝo. Li, revenante al sia korpo mallerteca de la unua juneco, preskaŭ falis pro la pezo de la jaroj.

Li ja estis maljuna. Ili ambaŭ ridis sen rigardi unu la alian...

Suno, lino, la tombejo de Bonaero, Debussy, kvindek jarojn poste...

—Mi volas diri —li parolis, rekaptante sian ekvilibron —ke estas muzikaĵoj, kiuj ankaŭ ne maljuniĝas, do ili devas esti fantomaj muzikoj. Kion vi pensas pri tio?

Ŝi turnis sin al li kaj rigardis lin serioze:

—Vi ĉiam plenumis la promeson, ĉu ne?

—Jes, mi neniam diris vian nomon... Jes... Ho, knabaj promesoj! Kiel vi pensas, ke mi trovis vin? Estis tre malfacile trovi vin sen povi eldiri vian nomon.



— Nomo sur tombŝtono gravas por neni.

—Same, ni ne parolos pri tio. Mi daŭre plenumos la promeson, eĉ se tio ŝajnas al vi sensecaĵo.

Li frotis siajn okulojn ridetante.

—Fantoma muziko neniam maljuniĝas. Kial mi neniam pensis tion?

Ŝia rigardo formis strangan harmonion kun ŝiaj haroj, akordon el oraj linsilkaj, belecon de dekkvin jaroj, kiam ĉio estas ebla kaj neebla samtempe, kiam tenero kapablas reaĉeti ĉion. Subite la tombŝtonoj fariĝis

senlima kampo el oraj linfloroj. Alia suno, tiu suno de la adoleskeco, la elaĉeto de iuj sonoj, iuj bildoj. Iu nomo, kiu neniam estos dirita.

Li ekparolis, timante, ke la silento denove forportos ŝin por ĉiam:

—Mi havis majstron kiu diris, ke tiu ĉi verko de Debussy enhavas aludon al Musorgski, al “Pentraĵoj de ekspozicio”, kiel muzikan ŝercon. Neniam plaĉis al mi tiu komento. Li estis fanfaronulo, ĉion tro analizis. Nu, mi pensas, ke mi ankaŭ estis iom tia dum ĉiuj tiuj jaroj. Ĉu vi konsentas?

Ŝi ridis, kaj la akordo fariĝis pli vasta, pli hipnota, pli blindiga. De Debussy al Musorgski, de la krepusko ĝis ŝiaj preskaŭ infanaj ŝuoj, de la fino al la komenco, de la strato da tomb-ŝtonoj ĝis la ora oceano da florantaj linplantoj...

Kaj tiam li, kiu certe analizis ĉion, komprenis, ke la tempo en retrospektivo fariĝas multe pli malrapida, ke ĝi akiras enorman densecon, kvazaŭ la muziko el malnova, malĝustagordita piano transformiĝus en gigantan belsimfonion.

Revaj linoj, revoj pli belaj ol tiuj, kiuj realiĝis nur por morti de malĝojo. Nerealigitaj revoj, oraj por ĉiam, eternaj kaj fantomaj. Kio ne estis, ne maljuniĝas, kiel fantomoj, kiel kelkaj melodioj...

Kaj tiam, rigardante ŝin, li volis paroli, sed ŝi metis la fingropintojn de sia maldekstra mano sur lian buŝon kaj ĉio eklumis. Magie, brilo tuŝebla, aŭdebla, flarebla. Lumo delino. Milda kaj ora lumo de lino. Eble la tempo mem estis misrakontita ŝerco. Kiu pensus nun pri la tempo? Sub la mildeco de ŝiaj fingroj, li ridetis. Kiel malgranda piano, ŝia buŝo respondis al tiu melodio de ridetoj en kontra-punkto legante lian koron.

—Mi devas iri nun.

La suno haltis malantaŭ la muro de la tombejo por aŭskulti ilin.

—Mi volis doni al vi ĉi tiujn orajn linflorojn kaj diri al vi...

Certe, li nur parolis por ke ŝi ne foriru. Li nur volis rememori, kiel ŝiaj linharoj aspektis sub la lunlumo. Mal-laŭte la memoro aperis kaj malaperis kiel plia fantomo.

—Ĝuste nun ĉio estas perfekta. Mi devas iri, kaj vi devos reveni baldaŭ por viziti min.

Ŝi insistis ridetante:

—Ĉu vi timas ne retrovi min?

—Ne, mi nur ne volas, ke vi reiru denove. Mi iros ankaŭ kun...

—Ni jam scias...

—Ni scias nenion, ĉio estas Mistero. Neniu scias pri tiu Mistero... Vidu, Mistero estas resti kun la buŝo fermita, ĝi estas greka etimologio. Ĉu vi sciistion? Mi iros kun vi kaj rakontos novelojn al vi. Mi verkos poemojn kaj mi inventos muzikojn, kiel Musorgski, "Nokto sur Kalva Monto". Aŭskultu, mi memoras, ke en la filmo "Fantazio", io okazas en loko kiel ĉi tiu. Mia patro kondukis min al la kinejo, mi perfekte memoras tiun, kaj mi ektimis pro tiu

sceno, ĝuste en tiu parto, kie ili reviviĝas...

Li ne volis diri tion, ŝi rigardis rekte al la suno, kaj ŝia profilo estis la plena lumo de la Mistero. Lino, ora, pleneco, kaj ĉiuj vortoj finfine velkis.

Ŝajnas absurde pensi, ke antaŭ la sunleviĝo, kiam la pordoj de la tombejo ankoraŭ ne malfermiĝis por la silentaj vizitantoj kun siaj melankoli-floroj, kaj dum la lastaj noktfantomoj ludas ion similan al la vivo, du adolesk-antoj vokas la sunon per krioj, per ridegoj petante ke ĝi rapidu, ke ĝi turniĝu pli rapide, ke ĝi akcelu ĉiujn

horloĝojn. La suno ne aŭskultas, oni jam scias.

Oni diras ke ŝi estas malgranda bela virino, knabino kun linharoj kiu portas antikvajn ŝuojn. Li estas junulo, kiu iam verkos ĉi tiujn vortojn.

### **Menciitaj verkoj**

- "La knabino kun linaharoj" – Claude Debussy (1910)
- "Pentraĵoj de ekspozicio" – Modest Musorgski (1874)
- "Fantazio" – Filmo de Walt Disney (1940).

## **Daŭrigo de la pago 12**

## **Por iom pripensi**

### **RIMEDOJ**

- HOMAJ RIMEDOJ:
  - \* nuntempaj esperantistoj, kiuj uzas kaj traktas pri sociaj retoj;
  - \* konsiloj de teknikistoj, profesiuloj pri reklamado kaj merkato;
  - \* subteno de Departementoj pri Edukado por Kursoj de Esperanto en lernejoj kontakti la Universitatojn, ĉefe

la Beletristikan Fakon de Universitatoj;

- \* Komitato por la organizado kaj akompanado de la Plano;
- \* Treinado de Instruistoj.

– FINANCAJ RIMEDOJ:

### **ANTAŬVIDEBLAJ OBSTAKLOJ**

- KIUJ
- SOLVOJ

### **LIMDATOJ**

# Aloísio Sartorato: Majtro pri Didaktiko kaj Esperantista Kulturo

Patrícia Guerra

*(Eseo dediĉita al la memoro de instruisto Aloisio Sartorato, kiu, se li vivus, festus sian 81-an naskiĝtagon ĉi-junie.)*

La intelekta kaj kultura kariero de instruisto Aloisio Sartorato estas markita de neŝanceblebla sindediĉo al lingva edukado kaj la antaŭenigo de la humanisma idealo per Esperanto. Lia heredaĵo transcendas la akademian sferon, atingante la pli larĝan universon de kulturo kaj internacia samideanaro. La ĉi tie proponita omaĝo celas ne nur rekoni la gravecon de lia verko, sed ankaŭ situigi ĝin en la kunteksto de liaj metodikaj kontribuoj al la instruado de Esperanto kaj liaj kulturaj agadoj en la esperanto-movado, samtempe emfazante la gravecon de la konservado de memoro kiel formo de rezisto kaj inspiro.

**Metodikaj kontribuoj: “Esperanto por komencantoj” kaj la demokratiigo de lernado**

Unu el la fundamentaj mejloŝtonoj en la kariero de Sartorato estas la kreado de la libro "Esperanto por Komencantoj", kiu fariĝis metodika referenco en la instruado de la internacia lingvo. Kun klara, progresema kaj sistema aliro, la verko reprezentas signifan progreson en la kampo de planlingva pedagogio.

Tuj en la enkonduko, la instruisto emfazas sian engaĝiĝon al demokratia aliro al lernado:

“Ĉi tiu libro estas destinita por tiuj, kiuj, eĉ sen antaŭa scio pri fremdaj lingvoj, deziras komenci lerni Esperanton praktike kaj efike” (SARTORATO, Esperanto por komencantoj, p. 7).

La adoptita metodaro baziĝas sur simpleco kaj funkcieco, provizante al la lernanto laŭgradan aŭtonomecon,

bazitan sur praktikaj ekzercoj, esenca vortprovizo kaj fundamentaj gramatikaj strukturoj. En unu el la plej didaktikaj pasaĵoj, la aŭtoro elstarigas:

“Lerni Esperanton, krom esti ponto inter popoloj, estas ekzerco de logiko kaj lingva disciplino atingebla por ĉiuj” (SARTORATO, Esperanto por komencantoj, p. 23).

Malsimile al proponoj kiuj troe prioritatigas teorion, lia verko favoras komunikadan aplikeblecon, respektante la individuan ritmon de la lernanto kaj plifortigante fidon je la lernado.

Krome, Sartorato sukcesis enmeti humanisman dimension en la manlibron, akorde kun la fundamentaj valoroj de Esperanto: respekto al diverseco, la idealo de frateco kaj la kredo je la transforma potencialo de edukado. Lia libro, tial, estas ne nur teknika instrumento, sed ankaŭ invito al kultura kaj etika engaĝiĝo.

### **"Saluton, samideano!": la afekcia kaj identeca dimensio de Esperanto**

En alia grava verko, "Saluton, samideano!", Aloisio Sartorato plivastigas sian kontribuon al la esperanto-movado kreante tekston, kiu iras preter la nur didaktika funkcio kaj profundiĝas en la afekcian, kulturen kaj identecbazitan dimension de esperanto.

En la antaŭparolo, Sartorato deklaras:

"Ĉiu esperantisto estas samideano, kunulo de idealoj, kiu aliĝas al miloj da aliaj en reto de amikeco, kiu transiras limojn kaj kulturojn" (SARTORATO, Saluton, samideano!, p. 5).

En ĉi tiu verko, li ne nur instruas, sed ankaŭ dividas spertojn, valorojn kaj memorojn pri la esperanto-movado, establante emocian ligon kun la leganto. La libro artikas kulturajn elementojn, historiajn rakontojn kaj reflektajn pri la rolo de esperanto en la antaŭenigo de paco kaj kunlaboro inter la popoloj.

En emblema pasaĵo, la aŭtoro skribas:

"Esperanto estas pli ol nur lingvo: ĝi estas viva espero por reciproka kompreno kaj universala respekto" (SARTORATO, Saluton, samideano!, p. 42).

La rakonta konstruo elstarigas la sentemon de la aŭtoro al la subjektivaj aspektoj de lernado kaj lingva aktivismo, valorigante la personan trajektorion de ĉiu Samideano kaj kuraĝigante la protagonismon de novaj kulturaj aktivuloj.

### **Kultura agado kaj heredaĵo por la esperanto-movado**

Aldone al siaj metodikaj kontribu-

oj, Aloísio Sartorato elstaras kiel unu el la plej gravaj figuroj en la kultura devastigo de Esperanto en Brazilo. Lia partopreno en konferencoj, renkontiĝoj kaj kulturaj agadoj reflektas konstantan engaĝiĝon al la antaŭenigo de la lingvo kaj valoroj de Esperanto. En "Saluton, samideano!", li esprimas sian forton emocie:

“Kiam ni renkontas Samideanon, ni trovas fraton en idealoj, iun kiu dividas la revon pri pli justa kaj frata homaro” (SARTORATO, Saluton, Samideano!, p. 68).

Sartorato komprenis, ke Esperanto estas ne nur komunikilo, sed ankaŭ etika kaj politika projekto kun tutmonda atingo. Lia aktivismo ĉiam estis gvidata de la defendo de interkultur-eco, solidareco inter popoloj kaj la demokratiigo de aliro al lingva scio.

En tiu senco, la kombinaĵo de lia metodika produktado kaj liaj kulturaj agadoj konsistigas ekzemplan heredaĵon, kiu inspiras instruistojn, studentojn kaj subtenantojn de Esperanto tra la tuta lando. Lia kapablo esprimi akademian rigoron, pedagogian sentemon kaj kulturan engaĝiĝon estas distinga trajto, kiu metas lin inter la grandajn nomojn de la nuntempa esperanto-movado.



La graveco konservi la memoron de Aloisio Sartorato viva.

La rekono de la trajektorio kaj heredaĵo de Aloisio Sartorato ankaŭ ligiĝas al la pripensado pri la graveco de memoro kiel struktura elemento de identeco kaj kulturo. Kiel Maurice Halbwachs asertas, "en kolektiva memoro, individuoj rekonas sian socian enmetiĝon kaj donas sencon al sia ekzisto" (Kolektiva Memoro, 1950). Teni viva la memoron de Sartorato estas, do, ago de konservado de la historio de Esperanto kaj gesto de kontinueco de ĝiaj valoroj kaj idealoj.

Simile, Paul Ricoeur emfazas, ke memoro estas esenca por ke ni "tekstu rakontojn, kiuj konservas identecon kaj gvidas agojn en la nuntempo" (Memoro, Historio, Forgeso, 2000). Memorante la vivon kaj verkon de Sartorato, ni eternigas lian kontribuon kaj reasertas la gravecon de lia verko.

En simila perspektivo, Walter Benjamin, en sia fama eseo "Pri la koncepto de historio", emfazas, ke "la pasinteco nur fariĝas legebla tiom, kiom ĝi estas reprenita kiel fulmanta bildo en la nuntempo" (1940). La memoro pri Aloisio Sartorato ekbrilas, lumigante la nuntempon de la esperantomovado kaj montrante vojojn por la estonteco.

## Finaj konsideroj

Omaĝi instruiston Aloisio Sartorato estas rekoni la gravecon de kariero markita per dediĉo al instruado, kulturo kaj la konstruado de pli justa kaj frata mondo. Liaj verkoj, "Esperanto para principiantes" kaj "Saluton, samideano!", estas ne nur referencaj tekstoj, sed veraj mejloŝtonoj en la formado de generacioj de esperantistoj kaj en la firmigo de kultura identeco bazita sur internacia solidareco.

Lia memoro kaj heredaĵo daŭre inspiru novajn iniciatojn favore al libera edukado kaj la konkreta utopio de homaro unuigita per reciproka kompreno kaj paco.

## Dankon, instruisto Sartorato!

## Bibliografiaj Referencoj

- HALBWACHS, Maurice. Kolektiva memoro. 2a eld. San-Paŭlo: Centauro, 2006.
- RICOEUR, Paul. Memoro, historio, forgeso. Tradukita de Alain François. Campinas: Unicamp Press, 2007.
- BENJAMIN, Walter. Pri la koncepto de historio. En: Elektitaj verkoj: magio kaj tekniko, arto kaj politiko. 7a eld. Tradukita de Sergio Paulo Rouanet. San-Paŭlo: Brasiliense, 2012. p. 222-232.
- SARTORATO, Aloisio. Esperanto por komencantoj. 3a eld. San-Paŭlo: Progresso Press, 2010.
- SARTORATO, Aloisio. Saluton, samideano! 2a eld. Curitiba: Aŭtora Eldono, 2015.



## Imaga interparolo kun filozofoj

### Renkonto kun Kartezio en Stokholmo (1649, vintre)

Jen mi denove vojaĝante tra la tempo, ĝis la glaciventa Stokholmo, kie lastatempe vivas la fama franca filozofo, invitita de la reĝino Kristina organizi tie novan sciencan akademion kaj instrui ŝin pri amo kaj aliaj filozofiaĵoj.

La renkontiĝo okazis en silenta ĉambro de la palaco, kie la filozofo sidas kaj tusas apud kameno, sub lankovriloj.

— Vi estas Sinjoro Kartezio, ĉu?... Pardonu min, se mi alvenas en malbona momento. Mi estas via admiranto el la 21-a jarcento.

Li levis brovon kaj respondis per kuraĝigaj vortoj de bonhumoro kaj fajna ironio:

— Jes, neatendata vizitanto, ĉi tiu estas mi, en karno kaj pensado. Vi ne alvenas en malbona momento, kon-

traŭe, resti nuntempe sub kovriloj estas por mi plezurego. Ĉu vi estas iluzio aŭ klara kaj distinga ideo?

— Se vi volas, tuŝu min, por certiĝi pri mia realeco, kvankam mi komprenas, ke vi, laŭ via metodo, dubas pri ĉio, eĉ pri viaj propraj sentoj.

— Tre bone, via respondo plaĉas al mi. Se estas eble, ke vi ekzistas, mi devas konsideri vin valida hipotezo. Do, diru al mi, kion la homoj de la dudek unua jarcento pensas pri mi?

— Vi estas konata kiel la patro de moderna filozofio. Via frazo “Mi pensas, do mi ekzistas” estas ikono. Kaj via matematiko... nu, ni uzas vian kartezian ebenon en preskaŭ ĉio — de medicino ĝis artefarita intelekto.

— (Ridetante) Mirinde. Mi imagis ke matematiko povus konduki nin ĝis la randoj de la universo. Do oni ankoraŭ

uzas miajn koordinatojn? Kaj ĉu eble miaj aliaj matematikaj esploroj — pri analiza geometrio kaj nombroj — ankaŭ fariĝos utilaj?"

— Utilegaj! — vi mirus, se vi povus vidi tion. Sistemoj de navigado, ĉu por vojaĝi sur la Tero aŭ al aliaj astroj, algoritmoj de klasifikado, videoludoj, datumoj montrataj en grafikaĵoj ... tiuj aferoj ekzistas danke al viaj esploroj. Vi transformis la manieron, kiel ni pensas pri spaco kaj reprezentado. Kaj, kiel kolektanto de mapoj, vi ĝojus vidi la ciferecajn mapojn, kiujn ni havas...

"Ho, kiel interese! Mi eĉ ne povas imagi, kio estas tiuj aferoj el la estonteco." Kaj diru... kion vi kaj viaj samtempuloj scias pri mia vivo?

— Sufiĉe multe, seriozajn kaj ne seriozajn aferojn. Ni scias, ke vi dormis en forno por pli bone mediti, ke vi rifuzis publikigi libron pro timo al la Eklezio, ke vi havis filinon ekster geedzeco, ke vi servis en armeo...

— (Ridante) Scivolemaj klaĉuloj vi estas. Pri la forno... ĝi ne estis vera forno, sed pli varmigita ĉambro. La varmo helpas klarigi la menson kaj dispeli la nebulon de dubo.

— Kaj pri duboj... via metoda dubo ankoraŭ estas diskutata de filozofoj, psikologoj kaj eĉ programistoj.

— Programistoj?

— Jes, ili estas homoj, kiuj kreas inteligentajn maŝinojn. Multaj provas instrui al komputiloj kiel pensi — uzante logikon, klarecon kaj evidentecojn... ĝuste kiel vi proponis.

— Hmm... Ŝajne, do, en via epoko la racio superregas...

— Pli-malpli, ne estu tro optimisma pri tio. Miatempe la racio kunekzistas kun multego da emocioj, ne fidindaj intuicioj kaj algoritmoj. Sed almenaŭ la pli prudentaj uzas vian ideon, ke la scio devas esti klara kaj logika

— Kaj ĉu la estontuloj kredas je Dio?

— Iuj jes, aliaj ne. Via pruvo pri dia ekzisto estas studata en universitatoj, apud kritikoj kiuj venis poste.

— Ho, kritikoj. Ili ĉiam venas. Sed diru al mi: ĉu oni demandas sin "kiu mi estas?", "kio estas reala?"

— Krom la amaso da homoj absorbitaj de trivialaĵoj, jes, iuj eĉ pensas, ke ni vivas en simulaĵo.

— Nu, estimata vizitanto, ŝajnas ke rilate al tio la mondo ne ŝanĝiĝos tre multe. Pri tiu penso, ke la realo estas simulaĵo, eble mia metoda dubo estis antaŭsento pri ĝi. Sed mi kredas ke, eĉ

se ĉio estas falsa, ĉiam ekzistos iu kiu pensas — kaj do ekzistas.

— Tiu via ideo ŝanĝis ĉion. Ĝi estis komenco de nova maniero pensi.

En tiu momento mi rimarkis kaj komentis, ke li komencis montri lacecon, do mi pardonpetis pro tio, ke mi tiel longe daŭrigis la dialogon kaj diris, ke mi foriros.

— Ne estas vere laceco, kion mi komencas senti — sed pli la maltrankvilo, kiu min kaptas, kiam mi memoras ke baldaŭ la reĝino vokos min por la ĉiutaga promenado tra la frostaj ĝardenoj de la palaco, dum kiu mi klarigas ŝiajn demandojn, kelkajn filozofiajn, sed aliajn... Ho Dio, kial mi ne rifuzis la inviton translokiĝi al ĉi tiu glaciejo, kie mi certe mortos antaŭtempe?

“Ankaŭ pri tio li havas trafan antaŭsenton”, mi pensis.

— Dankon pro la vizito, vojaĝanto el la estonteco. Scii ke miaj ideoj

kondukos al praktikaj aplikoj, ke mia geometrio portos la homon trans la ĉielon — tio min konsolas.

— Estas mi, kiu devas danki vin, kara majstro. Estu certa, ke via matematiko konstruos ciferecajn mondojn, via filozofio formos konsciojn, kaj via scivolemo... ĝi daŭre vivos.

En tiu momento servistino eniris la ĉambron por anonci al la filozofo, ke la reĝino lin atendas. Ni adiaŭis nin, sen ke mi havis tempon peti de li mesaĝon al miaj samtempuloj. Tial mi mem elektis du el liaj pensoj por fini ĉi tiun tekston:

“Dividu ĉiun malfacilaĵon en tiom da partoj kiom eblas, por ĝin pli facile solvi.”


“Vivi sen filozofiado estas kvazaŭ havi la okulojn fermitajn sen iam provi malfermi ilin.”

**José Mauro Progiante**

## Postmortaj verkoj

Allan Kardec

**Tradukis:**  
Affonso Soares | Paulo S. Viana



## San-Paŭlo

Maria Nazaré Laroca

L' aero de mia urbo  
malpli pezas ol la via.  
Eĉ sub plej varma suno  
la vento ĉiam zefiras,  
kaj vilaĝe glatas vivo.

Kvazaŭ ebria efiko  
mi ankoraŭ kaptuniĝas  
pro l' ekscita rememoro  
de ekĝojaj korfrapoj  
eĉ pro nura ekrigardo  
al tia mirega ĉarmo  
de via fama avenuo.

L' aero de mia urbo  
malpli pezas ol la via  
sed soifas kulturon  
animo enlanda mia.

*Maria Nazaré Laroca (El Penseroj (Poemaro). Campinas, Brazilo: Wechsler Editora de Livros Ltda, 2013. p. 32.)*

# La influo de amaskomunikiloj

Márcio Santos

Nuntempe oni multe aŭdas pri la influo de amaskomunikiloj en la socio, en la pensmaniero de la homoj. Ĉu la apogo aŭ malapogo por iu politikisto, socia aŭ politika fakto estas influata de la amaskomunikiloj aŭ sociaj retoj? Mi deziras respondi, kvankam ne profunde, tiun demandon.

Ni havas konojn, dank'al historio, ke dum la mezepoko la nobeloj kaj katolika pastraro (kelkaj el ili ankaŭ nobeloj), havis grandan povon. En tiu tempo ĉio estis ĉirkaŭ la grunda proprieto – la feŭdoj. Riĉaj kaj povaj homoj estis la feŭduloj, nobelaj homoj. La burĝoj (komercistoj, bankestroj) havis monon, tamen ne politikan nek influan povon.

Dum la periodo kiun ni nomas Moderna Epoko la burĝa grupo okazigis revoluciojn, ribelojn kaj militojn celante sukcesi starigi siajn valorojn kaj atingi politikan povon. Unu el la burĝaj movadoj estis la Franca Revolucio, sub la devizo libereco, egaleco kaj frateco. Libereco, egaleco kaj frateco propon-

ita nur por la burĝoj antaŭ nobelaro ĉar la sklavigo de homoj, en la francaj kolonioj, ne estis abolita kaj la malriĉuloj (viroj kaj virinoj) de Parizo kaj la kamparanoj ne rajtis baloti.

Tiel la burĝoj sukcesis atingi la politikan povon, samtempe al la disvolvigo de kapitalismo, burĝa sistemo, kaj iom post iom kondukis la sociojn laŭ sia maniero kaj vidpunktoj, kiuj estis: egaleco antaŭ la leĝo, libereco por havi proprajn kaj por esprimi, ebleco elekti siajn reprezentantojn. Tiuj estas la nuntempaj valoroj de la plejmulto el la socioj. La plejmulto apogas kaj sekvas a kapitalismajn (burĝajn) valorojn.

Alia ideo kiun mi volas prezenti al vi estas la propono de marksisma filozofo de la dudeka jarcento, kiu klopodis kompreni kiel la regantaj grupoj superregas ne nur perforte, sed ankaŭ per la ideoj. Lia nomo estis Antono Gramsci, kiu kreis interesan teorion dum sia arestado en faŝisma prizono en Italio.

Gramsci opiniis ke la superregado okazas ankaŭ per la idearo, por malgrandigi la perforton<sup>1</sup>. Tiel la superitaj grupoj akceptis en la ideaj kampoj la obeemon kvazaŭ necesan kaj ordinaran. Tiu regado, laŭ Gramsci, okazas per influo en sociaj organizoj: lernejoj, religio, milita servo, eĉ gazetaro. Gramsci taksis ke gazetaro estas politikaj doktriniloj, ĉar ĝi enmetis en la mensojn de la homoj unuecan ideologion favore al la superegantoj<sup>2</sup>. Mi komprenas, ĉikaze, ke superregantoj egalas, por Gramsci, la burĝojn. Do la burĝa klaso sukcesis enmeti en la mensojn de la homoj kapitalismajn valorojn.

Radistacioj, televidilo kaj sociaj retoj ne apartenis al la tempo de Gramsci. Eble li travivis iomete la komencon de radistacioj, sed lia teorio estas taŭga por la nunaj tempoj. Laŭ tiu teorio granda aŭ malgranda apogo por politikistoj, informoj kaj vidpunktoj okazas pro la amaskomunikiloj: TV, sociaj retoj, radistacioj, k.a.. Tiu vidpunkto sugestas ke la publika opinio estas tro influata de la amaskomunik-

iloj. Mi komprenas publikan opinion aŭ popolopinion kiel specifan opinion de grupo aŭ grupoj pri iu ajn afero.

La nuntempaj socioj, eĉ la brazila, estas konservativa. Ni valorigas morojn kiel familio, religio, patrio kaj mi opinias tion bona. Mi kredas ke estas universalaj moroj kiujn ni elektis tra la tempo, kiujn ni bezonas protekti por bona funkcio de la socio. Tamen, kelkaj homoj profitas tiujn vortojn (aŭ ideojn) por pravigi siajn vidpunktojn kaj antaŭjuĝojn sub la mensoga sinteno pri defendo de tiuj moroj.

Nia konservativeco inklinas nin kontraŭi ideojn ne konsentajn al niaj emoj. Tie ĉi mi revenas al la diskuto pri la influo de la amaskomunikiloj en nia ideologio kaj sociaj kaj politikaj okazoj. Kiom ni estas influataj kredi kaj akcepti ideojn kiuj ne estas niaj aŭ ne interesas al ni? Mi komprenas ideologion kiel aron da ideoj, kredoj kaj valoroj kiuj gvidas nian komprenon pri la mondo.

La franca historiisto Jen-Jacques Becker<sup>3</sup>, antaŭ jardekoj, enketis kaj



diskutis en artikolo ĝis kiam la publika opinio estas konstruita, kaj diskutis la falsiĝon kaj inklinon faritan de la amaskomunikiloj. Nuntempe ni povas ankaŭ inkluzivi la sociajn retojn.

Becker, per siaj esploroj, konkludis ke la rilato inter amaskomunikiloj kaj publika opinio ne estas unudirekta vojo, ĉar ekzistas interŝanĝo inter ili du. Li skribis: “la falsado nur havas ŝancon atingi sukceson kiam akompanas profundajn inklinojn de la publika opinio”<sup>4</sup>.

Nuntempe estas aliaj intelektuloj kaj pensuloj kiuj diskutas tiun tiklan kaj interesan aferon, sed per tiu ĉi simpla kaj supraĵa pripenso pri la influo de la amaskomunikiloj, mi konkludas ke kvankam diversaj influoj atingas nin per amaskomunikiloj, sociaj retoj, retaj influistoj, ktp., eksteraj influoj ne estas la nuraj motivoj. Nuntempe estas kresko de malamaj paroladoj, maltolero kaj ŝajnas ke homoj estas pli violentemaj, maltoleremaj, antaŭjuĝemaj, sed la inklinoj de la homoj faciligas kaj fortigas ekstremismojn. Ĉu ni retroiras pri la bonaj valoroj same kiel

etiko, egaleco, paco, respekto kaj frateca kunvivado kun homoj kiuj pensas malsame ol ni? Mi ne scias, sed mi esperas ke ne. Tamen mi opinias ke ĉiu el ni devas taksi sian homan nivelon kaj rimarki kiel tiuj valoroj estas ene de ni.

Mi kredas ke ni vivas sub burĝaj valoroj, kiuj ĝis nun estis la plej bonaj kiujn ni sukcesis krei kaj meti kiel universalajn, inter ili demokratio. Tio estas bona ĉar ni povas lukti por modifoj respektante malsamajn opiniojn. Kelkaj el tiuj valoroj estas bazaj por nia socio, sed misuzataj de kelkaj grupoj (dekstraj kaj maldekstraj grupoj).

Mi ankaŭ esperas ke la tria vorto de la devizo de franca revolucio “Frateco” estu starigita, ĉar la aliajn vortojn “libereco” kaj “egaleco” jure la plej multo de la socio jam atingis. Frateco devas esti la lasta limo kaj la plej malfacile transpasota por ke ni atingu sociojn sen militoj, malsato kaj kunharmonio. Ni esperantistoj, kiam defendas demokration inter la lingvoj kaj egalecon kaj respekton inter la kulturoj marŝas tiun vojon, ankaŭ.

---

1. GRUPPI, Luciano. O conceito de hegemonia em Gramsci, Rio de Janeiro, Graal, 1978.

2. SEMERARO, Giovanni. Gramsci e a sociedade civil, Petrópolis, RJ, Vozes, cap 2.

3. BECKER, Jean-Jacques, “A Opinião Pública”, in René Rémond (org.). Por uma história política, Rio de Janeiro, Editora UFRJ e FGV, 1996, p 192.

4. BECKER, Jean-Jacques. Id. Ib., p. 192.

# Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler



## Demando

Nia demando ĉi-foje rilatas al la uzado de akuzativo post propraj nomoj. Kiam ili estas esperantigeblaj, nenia problemo: *Mi vizitis Londonon. Mi admiras Johanon.* Tamen, kiam oni ne volas aŭ ne povas esperantigi proprajn nomojn, kiel uzi la akuzativon?

Kiel traduki jenajn frazojn?

*Visitei Santa Bárbara d'Oeste.*

*Muita gente admira Winston Churchill.*

*O mar invadiu São Pedro da Aldeia.*

*Os Esperantistas não esquecem Boulogne-sur-Mer.*

## Respondo

Por tiu demando ne ekzistas unu-sola aŭ ĝenerale plenkontentiga respondo. La unua ebla solvo estas simple rigardi tiujn nomojn kiel fremdlingvaj vortoj kaj ne uzi la N-finaĵon: Ekzemple: *Mi vizitis Santa Bárbara d'Oeste. Multaj homoj admiras Winston Churchill. La maro invadis São Pedro da Aldeia. La esperantistaro ne forgesas Boulogne-sur-Mer.*

En ĉi tiuj frazoj ne ekzistas dubo pri la subjekto kaj la objekto, sed ne ĉiam estas tiel simple: [...] *lembrou-me o incidente da véspera, e perguntei a Josefa o que haveria magoado a rapariga [...]* (M. Assis, Mariana, 1876). Oni povus traduki tion al: [...] *mi rememoris la antaŭan epizodon kaj demandis Josefa, kio ĉagrenas la junulinon [...]*; sed eble ekestus dubo, ĉu mi aŭ Josefa

demandis. Oportuna elturniĝo estus uzi nominacion kun N-finaĵo: *mi rememoris la antaŭan epizodon kaj demandis **fratinoN** Josefa.*

La nominacian solvon oni povus uzi ankaŭ por la aliaj ekzemploj: *Mi vizitis **la urbon** Santa Bárbara d'Oeste. Multaj homoj admiras **s-roN** Winston Churchill. La maro invadis **la turisman lokoN** São Pedro da Aldeia. La esperantistaro ne forgesas **la kongresejoN** Boulogne sur Mer. Fakte tiu ĉi solvo estas universale aplikebla, kvankam foje ĝi iom pezigas la frazojn.*

Zamenhof en tiuj okazoj konservis la originan formon, sed aldonis N-finaĵon al nomoj finiĝantaj per vokalo aŭ ON-finaĵon al nomoj finiĝantaj per konsonanto:

***MartaN** li vidis kelkfoje en sia domo [...] (Marta).*

*Li surĉevalo rajdis tra la profunda vala vojo, por veni en **WeimarON** kaj viziti **Molly'N**. (Fabeloj de Andersen 3).*

Sed kion fari pri nomoj el pli ol unu elemento? Zamenhof aplikis sian solvon al la unua nomo, sed lasis la ceteron sen N-finaĵo:

*Ĉu vi konas **ChristenON Pedersen?** (ne: Pedersenon). (Fabeloj de Andersen 3)*

*Multaj homoj admiras **WinstonON Churchill.***


Tamen ĉi tiun principon tre malfacile oni povus apliki al *Santa Bárbara d'Oeste* (**SantaN** Bárbara d'Oeste?). Kaj ĝi estas neaplikebla al *São Pedro da Aldeia* (**SãoN**???)

Kompreneble, se plene esperantigi alilingvan nomon, la uzado de la N-finaĵo fariĝas natura:

*[...] mi vizitos **Parizon** antaŭ mia veno **BulonjoN** [...] (Leteroj de Zamenhof).*

Se la nomo konsistas el pli ol unu elemento, oni normale uzas la N-finaĵon nur por la unua elemento:

*Mi venos **BulonjoN** ĉe Maro.*



## Prediko de la Diablo kaj aliaj rakontoj

Machado de Assis

Tradukis:  
Francisco S. Wechsler

## Digna omaĝo

Paulo S. Viana

Dum la dua duono de la dua jar-milo p.K., Brazilo estis scenejo de neimagebla tragedio. Tiel terura, ke ĝiaj eĥoj atingas la brazilan socion ĝis nun. Temas pri la multjara sklavigado de afrikanoj, kiujn oni kaptis en ilia kontinento kaj alportis trans la Atlanta Oceano al la brazilaj have-  
noj. Tiu transportado estis kruel-  
ega kaj suferiga, kaj multaj kapt-  
itoj, inkluzive de infanoj kaj  
junuloj, mortis survoje.

Ili estis milionoj da homoj, kaj la transportado daŭris jarcentojn. Fakte, Brazilo es-  
tis la lasta lando, kiu abolis sklavecon, en la mondo. Tiujn sklavojn oni traktis preskaŭ kiel bestojn, inkluzive kun la aprobo de religiuloj. Oni estigis subhoman, sed multenombran tavalon de la socio. Malgraŭ tio, la afrikaj negroj intense interrilatis kun la blankuloj kaj indianoj, kio transformis la brazilan popolon en grandan kaldronon de rasoj (se oni entute rajtas nomi



ilin rasoj). La negroj enkondukis en la brazilan kulturon sian trajton. Malgraŭ la malhomomeco, per kiu oni ilin traktis, ili belege kontribuis al tio, kion nuntempe oni nomas “la brazila animo”. Pro la moroj, pro la psiko, pro la religiemo, pro la artoj, Brazilo estas sendube heredanto de afrika kulturo.

La brazila socio multon ŝuldas al la negroj, kiuj estis venigitaj el Afriko. Ĝis nun, tiu ŝuldo ne estas plene pagita. Ekzemplo de tio estas la fakto, ke ankoraŭ en la 21-a jarcento, la plej malriĉa tavolo de la brazila loĝantaro konsistas plej multe el negroj.

Dum la lastaj jardekoj, multaj brazilaj intelektuloj klopodas esprimi sian rekonon kaj dankemon al niaj afrikdevenaj brazilanoj. En literaturo kaj en aliaj artoj, oni iom post iom faras tiun specon de “pardonpeto”. Sed ne nur tio: ke oni fine transdonu al tiuj homoj dignon kaj rajtojn, kiel ili meritas.

Mi konsideras, ke “La Nigra Spartako” estas romaneto, kiu klopodas partopreni en tiu movado. Originale verkita en Esperanto, ĝi rakontas la historion de Kam Golo kaj aliaj negroj, kiuj estis sklavigitaj en Afriko. En Brazilo, ili ne perdis sian kuraĝon kaj fieron, malgraŭ la krueleco de la portugalaj koloniigantoj. Ili krome partoprenis en la batalado de tiuj koloniigantoj kontraŭ la indiĝenoj, kiuj rifuzis submetiĝi. La mortigado de indiĝenoj kaj de ilia kulturo estas alia flanko de tiu granda tragedio. Kam Golo, forta kaj natura gvidanto inter siaj kunhomoj, travivis amaferon kun Mariana, ankaŭ ŝi sklavinino en la sama situacio de subprem-

ado. Tiuj homoj heroe ribelis, kaj per tio la aŭtoro montris, ke la “pasiveco” de tiuj afrikanoj (laŭ tio, kion oni instruis en brazilaj lernejoj) estas mensoĝo. Kam Golo, poste alnomata Zumbi, fondis vilaĝon en kampara regiono, kaj tie vivis konsiderinda kvanto da rifuĝintoj: la Palmovilaĝon, kiun poste la blankulaj batalantoj (kun helpo de indianoj) fine pereigis, post longa reistado. La titolo montras klaran aludon al simila homfiguro en la roma historio, nome gladiatoro Spartako, kiu vivis en la lasta jarcento antaŭ Kristo, kaj gvidis ribelon de miloj da homoj kontraŭ subpremado.

La tuta rakonto sekvas formalan elegantecon, same en la stilo kiel en la ritmo. La prozo de Mattos estas flua kaj agrabla, facile legebla. La verko iel alprenis la koloron de iom da romantiko.

Geraldo Mattos (1931-2014) estis unu el la plej eminentaj brazilaj Esperantistoj. Prozisto, poeto, lingvisto, li dum jaroj okupis la postenon de prezidanto de la Akademio de Esperanto.

“La Nigra Spartako” estis unue eldonita en la jaro 1955. Eldonejo Fonto, en Brazilo, reeldonis la libreton en 1986. Ĝi estas leginda literaturaĵo.



# Sekretoj de l'homa sentemo

Rimedlav

Dum infana periodo mi travivis sperton kiun mi rakontas al vi, atende ante reagon de fakuloj pri psikologio...

Mi sesjariĝis kiam sinjorino portanta bebon ĵus naskiĝintan petis al mia patro solvi gravan problemon kiun ŝi havis: neebleco zorgi la bebon, tial ŝi kalkulis pri lia helpo zorgi la infanon ĝis estos favoraj vivrimedoj por repreni la etulon kaj restarigi la patrinajn devojn.

Mia patro konsultis mian patrinon kiu senprokraste konsentis helpi la povran sinjorinon. Mi kaj miaj ses gefratoj ek de tiam ĝuis la plezurigan kunvivadon pro la nova etulo ĉe ni...

Du jaroj pasis ĉe nia hejmo plena de vivosignifo inter la familaj vivuloj kiam senatende reaperis antaŭ la pordo de nia domo la patrino de Karlo, nun ne plu bebo, sed tre gracia knabeto... Ŝi klarigis ke la vivo finfine normaligis sian vivokondiĉon kiu permesis zorgi sian filon. Kiel antaŭe konsentite, Karlo okupis sian ĝustan hejmon, kaj ni adiaŭis la amatan "frateton"...

La tempo pasis kaj mi forlasis la patran domon en internlanda urbo por labori kaj studi en la ĉefurbo de mia ŝtato.

Foje, kiam mi tridekjariĝis, decidis mi viziti mian patrinon internlande. Iun tagon, sidante en la verando de la domo kune kun mia patrino, sinjoro, akompanata de sinjorino kaj knabino, interrompis nian konversacion ĉar mia patrino stariĝis por rapide malfermi la pordeton de la ĝardeno. La sinjoro prenis la manon de mia patrino, kisis ĝin, kaj diris: "Vian benon, patrino"... Ne malgranda estis mia dubsurprizo. Rapide venis la klarigo: "Vi ne rekonas lin, ĉu ne mia filo?"... "Ne, mi respondis, kiu estas li?"... "Li estas Karlo, via frato!"... La mondo kvazaŭ falis sur mian kapon!

Tamen, ne nur pro tio ke mi ne rekonis lin estis la surprizo, sed ĉefe pro la fakto ke mi neniam kisis la manon aŭ petis la benon de mia patrino...



## Dorina Nowill — Rigardo de viziulo

*Prelego prezentita de Maria Cecília Milani en la sidejo de EASP  
kadre de ties julia Kulturkunveno.*

Dorina de Gouvêa Nowill estis brazila edukistino, filantropo kaj administranto. Kiel edukistino, Dorina laboris intense por la kreado kaj enkonduko de institucioj, leĝoj kaj kampanjoj favore al blinduloj, kaj pro sia laboro, ŝi estis plurfoje rekonita kaj premiita.

Ŝi naskiĝis en 1919, en la urbo San-Paŭlo. Blindiĝis je la aĝo de 17 jaroj pro okula infekto, kiu kaŭzis sangan don. La blindeco, tamen, ne malhelpis ŝin sekvi karieron en la kampo de edukado. En 1945, Dorina sukcesis konvinki la estraron de Lernejo Caetano de Campos, kie ŝi studis kaj diplomigis kiel instruistino, por starigi la unuan kurson de specialiĝo de instruistoj por la instruado al blinduloj. En tiu tempo libroj en Brajlo estis maloftaj kaj ŝi devis viziti la lernejon kiel normala lernantino.

Post sia diplomigo, ŝi vojaĝis al Usono kun stipendio pagita de la uso-

na registaro por sekvi specialigan kurson en la fako pri vida difekto, en la Universitato de Kolumbio. Post sia reveno, kun la subteno de volontulinoj, ŝi kreis la Fondaĵon por la Libro de la Blindulo en Brazilo (FLCB) en 1946, per la enkonduko de la unua grandskala brajla presilo en la lando, esenca por la legopovo de miloj da blindaj homoj tra la lando.

La eldonejo hodiaŭ estas unu el la ĉefaj fontoj de enspezo de la Fondaĵo,



Unua brajlo-presilo funkcia en Brazilo

kiu kreis kaj produktas pli ol 80% el la libroj de la Ministerio pri Edukado por blinduloj, krom ricevi specialajn menuojn de menuo por restoracioj, sekurecaj instrukcioj de flugkompanioj, furorlibroj, ktp.

La edukistino ankaŭ turnis sin al la reguligo de la edukado por blinduloj. En la Ŝtata Sekretariejo de Edukado de San-Paŭlo, ŝi respondecis pri la kreado de la Sekcio de Speciala Edukado por Blinduloj kaj en 1961, danke al ŝia klopodo, la rajto al edukado por la blinduloj fariĝis leĝo. En tiu sama tempo, inter 1961 kaj 1973, ŝi direktis la Nacian Kampanjon por Edukado de Blinduloj, la unuan nacian organon por edukado de blinduloj en Brazilo, kreitan de la Edukministerio.

Dorina ankaŭ realigis programojn kaj projektojn, kiuj lanĉis servojn por blinduloj en diversaj ŝtatoj de la nacio, krom eventoj kaj kampanjoj por la preventado de blindeco. Ses jarojn poste, en 1979, la instruistino estis elektita prezidanto de la Monda Konsilio de Blinduloj. Poste ŝi iĝis la idealisto kaj kreinto de la Fondaĵo Dorina Nowill, por la blinduloj.

En 1981, Internacia Jaro de la Handikapulo, ŝi estis invitita kaj parolis ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, kiel brazila reprezentanto. En la jaro 1989, la brazila



Dorina Nowill (1919 - 2010)

Kongreso ratifis la Konvencion 1599 de la Internacia Organizo de Laboro, kiu traktas la rehabiliton, trejnadon kaj profesiigon de vidhandikapuloj. Ĉi tio estis plia disvolviĝo de la laboro, kiun Dorina komencis preskaŭ du jardekojn antaŭe, kun la unua centro de rehabilito por blinduloj, kreita de ŝia Fondaĵo.

En tempo, kiam viroj estis la ĉefoj de ĉio, jam ĝuante sian emeritecon, Dorina estis protagonisto en la lukto por pli justa kaj inkluziva socio. Tiu laboro estigis la Fondaĵon, kaj en 1991, en rekono de ŝia laboro, la institucio nomiĝis Fondaĵo Dorina Nowill por Blinduloj. Dorina plenumis diversajn funkciojn kiel virino kaj gvidanto, aranĝante la personan vivon kun la profesia, en historia momento, kiam virinoj preskaŭ ne plenumis gvidajn rolojn, precipe kun handikapuloj.

Multo ŝanĝiĝis ekde tiam. Hodiaŭ, la Fondaĵo Dorina havas 65% de virinoj en gvidaj pozicioj en la plej diversaj kampoj – Financo, Administracio, Komunikado, Inkluziva Edukado, Akirado de Rimedoj, k.a. Ŝia agado kiel humanisto kaj edukisto estis rekonita nacie kaj internacie kun multaj honoroj kaj premioj. Ŝi estis konsiderita de la *Revista Época* unu el la 100 plej influaj brazilanoj de la jaro 2009.

Dorina edziniĝis kun la advokato Edward Nowill, filo de angla protestanta pastro. La paro havis kvin infanojn. Ŝi estis virino ekster la tempo, kiu kun majstreco kaj eleganteco implikis homojn kaj instituciojn en siaj projektoj de edukado kaj rehabilito. Dorina mortis en 2010, je la aĝo de 91 jaroj, sed ŝia heredaĵo daŭre vivas,

kiam temas pri civitaneco, aŭtonomeco kaj alirebleco por la nevideblaj. Dorina estis kaj ĉiam estos granda inspiro.

Dum pli ol sep jardekoj, la Fondaĵo Dorina Nowill laboras por la socia integriĝo de blinduloj kaj personoj kun granda vidperdo. Unu el la manieroj, kiel ĝi faras tion, estas per la produktado kaj senpaga distribuado de Brajlo-libroj, parolaj kaj ciferece alireblaj, rekte al la publiko kaj ankaŭ al lernejoj, bibliotekoj kaj organizoj tra Brazilo. Ĝia sidejo lokiĝas en San-Paŭlo, en la kvartalo Vila Clementino.

La brajla sistemo estis kreita en 1825 de la franco Louis Braille, kaj estis adoptita en Brazilo en 1854. Ĝi daŭre estas fundamenta por la inkluzio.



Fasado de la Fondaĵo Dorina Nowill situanta en la ĉefurbo Sanpaŭlo.

do kaj legopovo de blinduloj aŭ personoj kun malbona vidkapablo. Sed, indas emfazi la malfacilaĵojn, kiujn ankoraŭ hodiaŭ la blinda loĝantaro alfrontas por alfabetiĝi en la natura sistemo de skribo kaj legado por blinduloj, kiu estas brajlo. Nuntempe en Brazilo estas 6,5 milionoj da homoj kun severa vida handikapo, el kiuj 506 mil havas totalan vidperdon (0,3% de la loĝantaro) kaj 6 milionoj havas grandan malfacilecon vidi (3,2%).

Esperanto havas specifan brajlan alfabeton por reprezenti sian ortografion. La revuo *Esperanta Ligilo* estas eldonata en Brajlo ekde 1904 kaj la revuo *Aŭroro* ekde 1920, montrante la ekziston de literaturo en Esperanto en tiu formato. Kvankam ĝi ne estas vaste havebla literaturo, la ekzisto de brajlaj revuoj indikas, ke ekzistas literaturo en Esperanto alirebla por nevidpovaj personoj.

## Frazoj de Dorina Nowill:

*"La naturo estas saĝa. La riĉa potencialo de la homo strebas kompensi iujn ajn perdojn. Vi devas alfronti ilin kun via tuta realeco. Estas tre malfacile por iuj, sed ne tiom malfacile por aliaj. Facile, vere por neniu."*

*"Pri la ŝtuparo de la vivo, la ŝtupoj estas faritaj el libroj."*

*"Ĉiu havas rajtojn kaj devojn. Kiu ricevas, tiu devas doni. La kvadrata metro, kiun vi okupas en via vivo, devas produkti kaj redoni al la socio."*

*"Ĉiam estas io pli ol la malbonoj kaj la mankoj, kiujn prezentas al ni la vivo. Trans dubo estas kredo. Krom la suno, ekzistas la varmo kaj la energio, kiam la lumo malŝaltiĝas. Krom la vivo, estas la eterneco."*

*"Venki en la vivo estas resti staranta, kiam ĉio ŝajnas ŝanceliĝi. Estas batali, kiam ĉio ŝajnas kontraŭa. Estas akcepti la ne reakireblan. Estas trovi novan vojon kun energio, memfido kaj kredo."*

*"Mi faris ĉion, sed mi vere volis promeni por vidi ĉiujn tiujn belajn aĵojn, kiujn mi ne povis vidi."*

# La mistera domo de la Virgulino Maria

*Tradukita kaj adaptita de James Rezende Piton el la retejo  
"Visit Ephesus", Vizitu Efezon. Fotoj: Rinaldo Gallindo*

La regiono de Selçuk (regiono de Izmiro, okcidenta Turkio) jam de jarcentoj estas alloga loko por setliĝo, danke al sia abunda naturo kaj riĉa historio. Monto Bulbul kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas konsiderataj sanktaj de kristanoj. Ĉiujare, la 15-an de Aŭgusto, granda religia meso por honori la sanktan patrino de Jesuo estas celebrata sur Monto Bulbul kaj en la Domo de la Virgulino Maria.

Multaj kristanaj historiistoj asertas, ke Jesuo konfidis sian patrino al sia amiko kaj apostolo Sankta Johano, tuj antaŭ ol li estis krucumita. Post kiam Jesuo estis levita al la ĉielo, Sankta Johano decidis, ke Jerusalemo fariĝis tro danĝera por Maria, do li kunprenis ŝin al Efezo. Li ankaŭ celis disvastigi la parolojn de Kristo en Anatolio. Li sekrete kondukis Marian al tiu eta domo sur deklivo de Monto Bulbul, kie

ŝi pasigis la reston de siaj tagoj en paco.

La rakonto pri tio, kiel oni malkovris tiun domon estas fascina. En la 19-a jarcento, germana monaĥino Katarina Emmerich, kiu neniam estis vizitinta Efezon, malsaniĝis kaj restis sur lito. Ŝi senĉese murmuris pri la Domo de la Virgulino Maria dum sia delira stato. Ŝi donis tiom da detaloj pri homoj, lokoj kaj eventoj, ke oni scivolis, ĉar ŝi neniam estis en tiuj lokoj nek konis tiujn homojn. Eĉ iuj intelektuloj de tiu epoko estis mirigitaj de la fenomeno. Clemens Brentano, germana poeto de la romantika movado, agis kiel sekretario de Emmerich kaj verkis la libron "La Vivo de la Virgulino Maria" en 1818, surbaze de ŝiaj priskriboj. La libro vekis grandan intereson tiutempe, kaj religiaj oficiistoj ekkomencis esplorvojaĝojn al la



Foto kun Rinaldo Gallindo: "La cisterno"

regiono menciita en la verko. Laŭ la rakonto, dum unu el tiuj ekspedicioj,

malkovriĝis la domo sur deklivo de Monto Bulbul, 7 kilometrojn for de la urbo Efezo.

Teamoj estis senditaj al la loko por komenci elfosadojn, kaj la fundamentoj de domo el la 1-a jarcento post Kristo estis elterigitaj. Restarigaj laboroj estis faritaj en la 1950-aj jaroj, kaj Vatikano proklamis la domon sankta loko. En 1967, papo Paŭlo la 6-a, en 1979 papo Johano Paŭlo la 2-a, kaj pli lastatempe papo Benedikto la 16-a faris pilgrimojn al la Domo de la Virgulino Maria.

Efezo estis inter la plej famaj urboj de la antikva epoko. Precipe dum la romia periodo, Efezo estis la ĉefurbo de Malgranda Azio, kun siaj brilaj konstruaĵoj kaj artaĵoj. La fonto de ĉi tiu riĉeco estis sendube la haveno, kiu ebligis komercon kun Romo, kaj la



proksimeco al la fekundaj teroj de Anatolio.

Pro sia strategia geografia pozicio, dum la disvastiĝo de Kristanismo Efezo estis unu el la unuaj sep eklezioj establitaĵoj en Anatolio. La letero de la granda ekleziulo Sankta Paŭlo al la Efezanoj, trovata en la Nova Testamento, estis verkita post kiam Paŭlo dufoje vizitis Efezon. En la Nova Testamento, Efezo estas menciita 12-foje, kaj ekzistas 5 ĉapitroj rekte adresitaj al la efezanoj — tio pruvas la gravecon de la urbo en tiu epoko.

Krom la eta domo konata kiel la Domo de la Virgulino Maria, tie troviĝas cisterno, sankta fonto kaj kelkaj ĉirkaŭaj muroj, kiuj ankoraŭ staras. Kvankam la malgranda konstruaĵo estas nomata “domo”, ĝi estas malgranda kapelo en formo de kruco. La muroj montras arkitekturajn trajtojn de la 6-a aŭ 7-a jarcento. La plej malnovaj restaĵoj trovitaj tie devenas de la 1-a jarcento post Kristo. La domo ricevis sian finan strukturon ĉirkaŭ la 13-a jarcento. Post zorgema restaŭrado en



Foto kun Rinaldo Gallindo: "La Domo"

la 1950-aj jaroj por revivigi la originalan arkitekturon, la domo fariĝis pilgrima loko agnoskita de la tuta kristana mondo, post kiam Vatikano deklaris ĝin tia.

La domo ĉiujare gastigas la grandan meson honore al la Virgulino Maria, la 15-an de Aŭgusto.



# Ĉu literaturo estas ankoraŭ inventaĵo?

Luís Euclides dos Santos

*Literaturo estas inventaĵo.*

*(Vladimir Nabokov)*

Antaŭe, la formo pli gravis en la literatura kreado ol la enhavo. Nuntempe, pro la politika ĝusteco kaj la konsekvenca antaŭzorgo fare de la verkistoj, ŝajne la enhavo fariĝis pli grava ol la formo.

Antaŭe, oni povis rekoni la stilon de verkisto per la originaleco de la formo uzita en lia aŭ ŝia literatura kreado. Nuntempe, oni observas veran pasteŭrizon de stiloj, kiu ofte igas neeble distingi inter unu verkisto kaj alia.

Samtempe, denove pro la kialoj menciitaj en la unua alineo, senspritaj kaj unuformaj enhavoj proliferas en la fizikaj kaj ciferecaj libroj. Fariĝas pli kaj pli malfacile trovi libron, kiu estu kaptema kaj en la formo kaj en la enhavo.

Evidente, estas esceptoj al tio, kio estis dirita supre. Estas ankoraŭ verk-

istoj, kiuj elstarigas pro la originaleco en la formo kaj aŭtentikeco en la enhavo de sia literatura kreado.

Finfine, kiel ĉiuj scias, fikcia verkaĵo estas nur produkto de la imago de ĝia aŭtoro. Malgraŭ tio, en tempoj de soci-aj retejoj, kiam malmultaj homoj legas ankoraŭ librojn, restas la demando: ĉu literaturo estas ankoraŭ inventaĵo?



# Memorigo

Proksimiĝas la dato de nia septembra evento okazonta en la urbo São José dos Campos. Pli ol kvindeko da homoj el 25 urboj kaj 7 ŝtatoj jam aliĝis al la du-taga evento.

La programo konsistas el 8 prelegoj kaj 4 prelegetoj, 3 atelieroj, babilado kun verkistoj kaj tradukistoj, babilado kun fora gasto kaj prezentado de du-akta skeĉo. La kompleta programo kaj aliaj informoj estas disponeblaj en la retejo: [evento.easp.org.br](http://evento.easp.org.br)

Al tiuj kiuj intencas partopreni en la evento sed ankoraŭ ne petis aliĝon, ni atentigas pri la baldaŭ finiĝonta periodo de kotizoj kun favoraj prezoj: 70,00 por membroj de EASP kaj 100,00 por ne-membroj.

La reta aliĝilo estos disponebla en la kongresa retejo ([evento.easp.org.br](http://evento.easp.org.br)) ĝis la 15-a de septembro. Post tiu dato, novaj aliĝoj povos esti petitaj surloke kun modifitaj kotizoj: 100,00 por EASP-membroj kaj 130,00 por ne-membroj.

Gejunuloj (ĝis 29-jaraj), infanoj kaj lokaj vizitantoj estas liberaj je kotizo-pago.

Ĝis baldaŭ en São José dos Campos!



**17-a E-Kongreso  
de la Ŝtato Sanpaŭlo**

**Hotelo Ema Palace**

**20 - 21 sep 2025**

# Plej freŝa eldonaĵo de EASP



Suspensa romano  
originale verkita  
en Esperanto kun  
dekkvino da belaj  
ilustraĵoj tutpaĝaj.



Per aĉeto de ĉi tiu verko vi subtenas  
la Edukan Fonduson de **Programo  
Mia Amiko** ĉe EASP, ĉar 80% de la  
vendoj iras rekte al ĝi.

[easp.org.br/butiko](http://easp.org.br/butiko)